

Heinrich Heine,  
Die Lorelei

Ich weiß nicht, was soll es bedeuten,  
daß ich so traurig bin;  
ein Märchen aus alten Zeiten,  
das kommt mir nicht aus dem Sinn.

Die Luft ist kühl und es dunkelt,  
und ruhig fließt der Rhein;  
der Gipfel des Berges funkelt  
im Abendsonnenschein.

Die schönste Jungfrau sitzt  
dort oben wunderbar,  
ihr goldnes Geschmeide blitzet,  
sie kämmt ihr goldenes Haar.

Sie kämmt es mit goldenem Kamme,  
und singt ein Lied dabei;  
das hat eine wundersame,  
gewaltige Melodei.

Den Schiffer im kleinen Schiffe  
ergreift es mit wildem Weh;  
er schaut nicht die Felsenriffe,  
er schaut nur hinauf in die Höh.

...

Heinrich Heine,  
Lorelej  
*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita  
malgaj' en la koro naskiĝis;  
el tempo jam enterigita  
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,  
la Rejno mallaŭte babilas,  
per oro de l'sun' en vespero  
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:  
en ora ornamo brilante,  
sur supro de l' monto ŝi sidas,  
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
kaj kantas tra l' pura aero,  
kaj forto mirinda sin trovas  
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,  
ŝipisto ekstrems de l' kanto,  
kaj blinda por ĉiu dangero  
rigardas li al la kantanto.

...

Heinrich Heine,  
Lorelejo  
*tradukita de Joachim Gießner*

Malgajon mi sentas en koro,  
sed kial tia tim'?  
Legendo el pratempa foro  
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,  
kaj malvarmetas l' aer'.  
Sed brilas la mont' en orbelo  
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, mirige  
potenca melodi'.

Ŝipiston en eta boato  
Turmentas koremoci'.  
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,  
rigardas nur supren al ŝi!

...

Ich glaube, die Wellen verschlingen  
am Ende Schiffer und Kahn;  
und das hat mit ihrem Singen  
die Lorelei getan.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1823.*

Arg-2-2 (2014-04-23 18:09:02)

*Aus dem Werk “Buch der Lieder”, Kapitel “Die Heimkehr”, Abschnitt II. Siehe auch ein <http://gutenberg.spiegel.de> unter: [http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xd=1131&kapitel=12&hash=eb14eca2272#gb\\_found](http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xd=1131&kapitel=12&hash=eb14eca2272#gb_found). Vidu ankaŭ: [http://www.gedichte.vu/?die\\_lorelei.html](http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html). La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vidu la retejon [http://www.lieder-archiv.de/die\\_lorelei-notenblatt\\_300493.html](http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html).*

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela  
perdiĝis sub l' akvoturnado;  
gin Lorelej' faris kruela,  
per sia mirinda kantado.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhof, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

*Tiu ĉi tradukversion mi prenis el retejo [http://www.esperanto.mv.ru/Kolekt/o\\_Lorelej.html](http://www.esperanto.mv.ru/Kolekt/o_Lorelej.html).*

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo  
la ondoj lin kun boat'.  
Nun kuſas li en la profundo  
pro Loreleja kantad'.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

*Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto “Mia kantaro I”, eldonita de Josef Schiffer (Wilstorffstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: [Josef.Schiffer@t-online.de](mailto:Josef.Schiffer@t-online.de) ), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo “Fervoja Esperantisto” de Germana Ferojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo3.*